

Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

P.O. Kesto 25041,
3001HA Rotterdam,
Nederlando.

Numero 13;

IKEF
★
1984

aŭgusto, 1986.

La IKEF-a kunveno en Pekino,

en la kadro de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto.

Por ni, la ĉefa evento de la plej granda ekstereŭropa Kongreso de Esperanto estis, laŭ antaŭa aranĝo, la kunveno de nia Fakgrupo.

Posttagmeze de la 31-a de julio, Ĉambro Baghy estis plenplena je kongresanoj; ĉiu sidloko estis okupita. Entute ĉeestis 38 personoj, el 14 landoj, kaj inter ili kvinopo de membroj niaj.

Kun aparta plezuro oni rekonis la ĉeston de S-ro G. Maertens, ĵus-antaŭa Prezidanto de UEA: Akademiano W. Bormann, kaj S-ro Lee Jung-Kee, Membro de IKEF en Suda-Koreio. Ĉe la prezida tablo troviĝis la Prezidanto de IKEF, S-ro Franz J. Braun, kaj D-ro Istvan Gether, Estrarano kaj unu el la plej unuaj kunlaborantoj por fondi la Fakgrupon.

S-ro Braun bonvenigis la ĉeestantaron, kaj mallonge klarigis la kialon por la kunveno, aldonante koncizajn informojn pri la agadoj de la Fakgrupo kaj la realigado de ĝiaj planoj. S-ro Braun prezentis la organon de la Fakgrupo, la Laŭokazan Novaĵleteron, kaj montris, ke ĝi informas la membraron pri okazaĵoj, pri decidoj de la Estraro, pri proponoj por estontaj agadoj, kaj pri la nomoj kaj aliaj detaloj de novaj membroj. Elstare sukcesa tasko plenumita de post la fondiĝo estas varbado de novaj membroj, tiel, ke la nombro jam superas kvardek, kiu por tia tre juna instanco estas kuraĝiga, kvankam por plenumi nian agadplanon ni rekonas la bezonon de multe pli da membroj.

S-ro Braun rakontis pri la entreprenitaj paŝoj en la kampo de terminologia laboro, kaj donis apartan mencion al la tasko, akiri reklamanoncojn por revuo MONATO. Pri tiu lasta kampanjo, valoris mencii la akiron jam de

gravaj reklamoj, sed plifortigo de la laboro estas bezonata, ĉefe kun la celo akiri daŭran anoncadon. S-ro Braun koncize citis erojn de la agadprogramo, kaj de la Statuto de IKEF. Li donis apartan mencion al la stabila stato de la kaso de la Fakgrupo, donante apartan mencion al la ciferoj de la duonjara bilanco ĵus prezentita al la Estraro.

Laŭ antaŭa interkonsento, reprezentantoj de la kooperativa movado aliĝis al tiu ĉi kunveno. Al la kunveno donis oficialajn informojn S-ro Oszkár Princz, en la nomo de la estraro de la hungara Esperantista kooperativa movado. S-ro Princz disdonis informilojn pri la kooperativa Esperanto-agado en Hungario, kaj prezentis ĝian organon, la Kooperativan Stelon. Li raportis, ke dum la pasintaj jaroj ekfunkciigis tutlanda reto de kooperativaj Esperantistoj, ĝis tio, ke en ĉiuj provincaj kooperativaj ligoj laboras oficiale kunlaborantoj por Esperanto. S-ro Princz rap-

La IKEF-a kunveno en Pekino - daŭrigo.

ortis la planojn por starigo de Internacia Kooperativa Esperanto-Organizaĵo, kiu plej eble okazigos fondkunvenon dum la 72-a U.K. dum 1987 en Varsovio.

S-rino Bošković rimarkigis la eblecojn uzi la i.l. dum negocoj, dirante, ke ŝi jam plurfoje sukcesis en la kadro de sia laboro ĉe eksport-import-kompanio. Ŝi alvokis ĉiujn, kiujn interesas la vendado kaj aĉetado de aĵoj multspecaj, kontaktiĝi kun ŝi.

S-ro Ŝvistak, parolante en la nomo de la pola kooperativa movado, menciis du filiojn de la pola organizaĵo, en Poznań kaj Kral. Li esprimis la opinion, ke kondiĉoj ja estas maturaj por fondo de internacia asocio, kaj aliĝis al la propono okazigi tian fondiĝon en la venonta jaro.

D-ro Goldman, eldonanto de la Ekonomia Bulteno pri Usono, kaj la Internacia Komerca kaj Ekonomia Revuo, faris pledon por pli da landaj reprezentantoj por la eldonadoj. Li menciis la bonajn atingojn de la japana peranto, (kiu estas Membro de IKEF), kaj invitis membrojn de IKEF verki artikolojn por publikigo en la revuoj. Li emfazis, ke alta nivelo de la enhavo ne estas nepre kondiĉo por akcepto.

Akademiano Bormann substrekis la gravecon de fakvortaroj. Laŭ lia opinio, terminara laboro estas necese, aparte en kunlaboro kun aliaj laborantoj en la sama agadkampo.

Prenante la saman temon, D-ro Gether menciis la Internacia-Komerca-Ekonomika-Vortaro-n en naŭ lingvoj, kaj aludis al la klopodoj de S-ro Vogelmann akiri kunlaboron por aliaj lingvoj. D-ro Gether pledis por aliĝo al la laboro organizita ene de TeS. Mallonge, li parolis pri la hungara Ekonomikista Grupo, kiu eldonas la Sciencajn Komunikaĵojn. Tiu lasta estas popularscienca

eldonaĵo, kiu aperas en granda eldonkvanto, vivtenas pere de reklamanoncoj, kaj utiligeblas ankaŭ por la celoj de IKEF.

S-rino Matuda parolis entuziasme pri la hungara-japana kunlaboro en kooperativaj terenoj. Ŝi emfazis sian konvinkon pri la avantaĝoj de Esperanto, uzinte ĝin en la kunlaboro inter kooperativaj ligoj. Ŝi disdonis informilojn pri la Japana Konsuma Kooperativa Unuiĝo.

S-ro Lee Jung-Kee, nova membro de IKEF, raportis pri la korea filio. Ĉe la firmao Xian Hong, S-ro Lee utiligas Esperanton en komerca fako.

S-ro Lukács, redaktoro de la Sciencaj Komunikaĵoj, parolis pri la eldonplanoj de tiu periodaĵo. Ĝi baldaŭ aperos sub alia nomo kaj kun iom ŝanĝita enhavo, kaj estos abonebla.

S-ro Cwik, kunlaboranto ĉe la sidejo de la Eŭropa Komunumo, akceptis la gravecon de la revuoj sed samtempe volis emfazi la bezonon plifirmigi la ligojn inter ekonomikistoj kaj aliaj fakuloj. Por tiu celo, adresaro de la samfakuloj estas tre grava, pro tio, ke tia adresaro ebligus kontaktojn kaj tiel gravus kiel solida bazo por ĉiuj agadoj. S-ro Cwik esprimis la opinion, ke kunmeto de nova fakvortaro povas esti nur longdaŭra, fora celo. Citante spertojn en komitato de la EK-o, li menciis naŭlingvan vortaron la EK-o, kiu povus esti taŭga bazo en la terminara laboro.

S-ro Liu Fu urĝe pledis por revizio de PIV kaj pro aperigo de apartaj fakaj terminaroj.

S-ro Xiao Ke, ĉefingenero en ĉina uzino, parolis pri spertoj en la uzino, kiu produktas specialajn maŝinojn por uzado en la kampo de geologio.

Estis evidente al ĉiuj ĉeestantoj, ke ekestis vigla diskuto inter entuziasmaj partoprenantoj.

S-ro Braun respondis mallonge

La IKEF-a kunveno en Pekino - daŭrigo.

al kelkaj demandoj, kaj esprimis dankojn al ĉiuj partoprenintoj. Nur pro elĉepriĝo de la disponebla tempo, li fermis la kunsidon per la espero, reokazigi kunvenon en la Jubilea Jaro, en Varsovio.

István Gether,
raportinto.

----- oo -----

Noto de la Ĝenerala Sekretario.

La prialudita antaŭa interkonato ebligis al 'la kooperativa movado' dividi kun ni la kunvenon, estas interkonsento farita sen antaŭa aprobo de la Estraro de IKEF; verŝajne ĝi estas loka aranĝo farite lastmomente. Ni nun atendas sciigon de la intenco de 'la kooperativa movado' dividi kun ni la kostojn starigi la kunvenon.

lm

La Perantoj de IKEF.

1986-08-15.

Brito:

S-ro P. Foss. (3,50 pundoj?)
Long House Hotel,
Pilton, Som., BA4 4BP;

Francio:

S-ro F.-X. Gilbert, xx
Vert Coteau,
Longeville-en-Barrois,
55000 Bar-le-Duc;

Okc.-Germanio:

S-ro F.J. Braun, x
Hornisgründestrasse 8,
7580 Bühl 16;

Italio:

D-ro M. Picasso, (15000 lit?)
via De Gasperi 7,
20057 Veduggio al Lambro;

Jugoslavio:

S-ro S. Taleski,
ul. 'Oslo' br 12,
91000 Skopje.

ADMINISTRADO

La Ĝenerala Sekretario - raportas:

1. En la nomo de la Estraro, mi formale anoncas la nomigon de S-ro Roland Rotsaert, en Belgio, por esti Financa Konsilanto de la Fakgrupo. S-ro Rotsaert transprenos la ŝargon efektive ekde la 15-a de septembro, sed nenio malhelpas, se eĉ antaŭ tiu dato iuj promesoj de donaco, informpetoj rekte ligitaj kun financaj aferoj, aŭ similaj traktadoj, estu senditaj rekte al li. La Estraro petas la plej eblan subtenon por S-ro Rotsaert en la nova posteno.

2. Sekve de la jusanoncita nomigo, ni publikigas la adreson de la nova Financa Konsilanto. S-ro R. Rotsaert, IKEF, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, Belgio.

3. Kunsido de la Estraro okazos en Bruĝo, (Brugge), je la 13-a de septembro. Tagordo por la kunsido estas jam sufiĉe longa, sed se iu membro volas diskutigi urĝan temon, aŭ certigi aldonon de opinio pri konata temo, tiu persono estas petata sendi mallongan noton pri tiu al la Ĝ.S. por atingi lin plejlaste je la 11-a de septembro.

Lawrence Mee,
Ĝenerala Sekretario.

Roterdamo,
1986-08-15.

Limdato por la proksima Novajletero estos la 15-a de oktobro, tie ĉi en Roterdamo.

Respondeca redaktoro kaj eldonanto de la Laŭokaza Novajletero estas S-ro Lawrence Mee.

La poŝtadreso de la Fakgrupo:

Fakgrupo Komerca,
Postbus 25041,
3001 HA Rotterdam,
Nederlando.

x) Kto 713104 Volksbank Bühl (BLZ 66291400) 20-D

xx) CCP 1275-89 L NANCY

To RF

INTERKONATIĜO

Kun plezuro ni bonvenigas novajn membrojn al nia Membro-listo.

Havante sep nomojn, tiu ĉi listo estas aparte feliĉiga, ĉu ne? La konstato, ke en ĝi estas du virinoj estas ankaŭ aparte feliĉiga. (La fakton, ke unu el tiuj virinoj estas fratino de via G.S., ni tenu sekreta, eble?)

Ke kvar el la novaj Membroj loĝas en lando por kiu ni lastatempe nomis Peranton devas esti okazo por gratulojn kaj dankojn pro tre efika agado, kaj ke la aliĝo de nia nova Membro en Jap-

anio estas ne-rekta rezulto de la iniciato de la Komerca Ĉambro en Bar-le-Duc, plus la rekono de du novaj Membroj en Francio, certe estas memorinda evento. Unu el la novaj Membroj estas organizo: vojaĝagentejo; du novaj Membroj vivtenas per pangajna laboro en la kampo de komputoroj, kaj alia devigis nin serĉi la vortarojn por klarigo pri profesio.

Legu la liston, kaj gustumem la detalojn!

Membro-listo je 1986 - 08 - 15.

- | | | |
|----|---|----------|
| 43 | Yamasaki, S-ro Seikō, stabano de internacia komerca kompanio; Higasi Koigakubo 3-18-12, Kokobunzi, Tōkyō 185, | Japanio; |
| 44 | Callaghan, S-rino Audrey J., instruistino; 4 Gatesgarth Road, Manchester M24 4NA, | Britio; |
| 45 | Esperantotur en Britio, vojaĝagentejo; 4 Casaba Terrace, Llanfoist, Abergavenny NP7 9NR, | Britio; |
| 46 | Alexander, S-ro Robert, sistemanalizisto; 25 Church Road, Aldershot, Hants., GU11 3PR, | Britio; |
| 47 | Sly, S-ro Arthur, komputorprogramisto; 200 Nevells Road, Letchworth SG6 4TZ, | Britio; |
| 48 | Chabriac, S-ro Alain, dokumentisto; 7 Sente de la Cueillette, 95610 Eragny-Oise, Francio; | Francio; |
| 49 | Dyel, S-rino Claudine, grafologia konsilistino; 9 av. Charles de Gaulle, 74200 Thonon les Bains, | Francio. |

Kiel kutime, ni petas sciigon pri iuj ajn eraroj de detaloj en publikigitaj informoj pri niaj membroj.

-oOo-

Niaj mecenatoj

Ni esprimas apartajn dankojn al Membroj kiuj lastatempe faris donacojn al la kaso.

Dankon! al:

D-ro Gether kaj S-roj Gilbert kaj Rotsaert.

La Propaganda konto de IKEF.

Nia nova konto, el kiu pagi, espereble, estontajn kostojn de varbagado, inkluzive de informado kaj, tutsimple, propagando, restas malplena. Ni ankoraŭ atendas la unuan donacon! Ni ankoraŭ atendas la unuan promeson de donaco!

Interŝanĝo de ideoj.

Por la dua fojo en sinsekvo, nia raporto pri interŝanĝo de ideoj dediĉigas al terminologia laboro. Sed kun diferencoj tiel ne-antaŭviditaj, ke versajne legantoj ricevos surprizon.

Pasintfoje ni raportis nian provon establi kontaktojn kun instanco, kies nomo ni tiam supozis esti, Terminologia Sekcio de UEA, kun sidejo en Budapeŝto. Pli-alpli samtempe kun la forsendo de la lasta Novaĵletero, respondo venis el tiu instanco al ni, sed anstataŭ la klarigojn pri konkretaj planoj, kiujn ni petis, ni ricevis tre nebulan skizon senescepte teoriumaĵojn, verkitan de evidenta nekompetentulo.

En la sama koverto estis malmulto de proponita Statuto por proponita Terminologia Esperanto-Centro, instanco kiun oni intencas fondi dum la venontjara Universala Kongreso. Tiu Statuto simile estas kolekto de nebulaj proponoj, krom en tio, ke oni evidente pensas pri grandioza, prestiĝoplena organizaĵo, kiu estos 'la' termino-normiga instanco por la tuta Esperanto-Movado. Vane ni serĉis ĉiun tekston por trovi spuron de kredebla, serioza alveno al la tasko evoluigi la lingvon.

Sen konscia sekvo de pensoj, ni venis, vole-nevole, al la demando: Kial oni volas starigiti instancan, en Budapeŝto, kiam jam ekzistas la Akademio de Esperanto?

Spronite por trovi respondon al tiu demando, ni dediĉis tempon al esplorado pri la tuta temo.

Venis en niajn manojn la kajero de revuo Esperanto por junio; elstare en tio estas ĉapitro 13 de la Estrara Raporto (de UEA) pri 1985. Revuo Esperanto por januaro kaj majo, ĉi-jare, havas aliajn tekstojn.

Ni retrovis la bultenon, la Aktoj de la Akademio, 1963-1967, kaj studis tie la Statuton de la

Akademio.

Revuo El Popola Ĉinio por majo liveris tre polemikan artikolon pri terminologia laboro, evidente el la plumo de sincera homo forte ligita kun la budapeŝtaj teoriemuloj.

Gustatempe, ni ricevis la nove eldonitan libron, Akademiaj Studoj 86, en kiu estas represaĵoj de aliaj artikoloj kaj krome originale verkita respondo de la redaktoro. Tiuj represitaj artikoloj plifortigis ĝis konvinkigo nian impreson, ke la diversaj aŭtoroj kaj proponintoj malmulton scias pri la vera bazo de la lingvo kaj movado kiu estas Esperanto. Evidente mankas al ili komprenon pri la kvalito de oficialeco de radikoj. aŭ eble pri la rolo de la Akademio en tuto.

Sen ebleco pruvi ĝin, ni akiris senton de certeco, ke la verko, Plena Vortaro de Esperanto, estas nekonata al tiuj homoj, kiuj volas esti la kuraturoj de la estonteco de nia lingvo.

Logike leviganta demando, post tiuj esloroj, estas: Kial levigis la ideo anstataŭigi la Akademion per nova instanco?

Malmulte da pripensado kondukis al konkludo, ke la Akademio ŝajne ne plenumas siajn celojn, almenaŭ en la termino-normiga kampo. Re-studado de la Statuto de la Akademio konfirmis por ni, ke tiu Akademio laŭ-Statute rajtas entrepreni ĉiun agadon antaŭviditan por tiu proponita termino-normiga instanco. Evidente manko, almenaŭ en la lastaj kelkaj jaroj, estas bone funkcianta organiza bazo por la Akademio; ligita kun tio versajne estas manko de kapitalo, ĉar ne eblis al ni malkovri publikigitan Bilancon por la lastaj dek unu jaroj. Sed restas ĉe ni la konvinko, ke iu necesa termino-normiga agado estus multe pli kapable farita per la Akademio ol per nove starigita instanco, kies kunlaborantoj versajne estas pli kapablaj elpensi teoriojn ol entrepreni efikan eluzadon de financaj rimedoj.

Tre lastatempe venis la rap-

Interŝanĝo de ideoj - daŭrigo.

orto pri la kunveno en Pekino de IKEF. Tutevidente, multe da kapablaj homoj volas rekoni pliefikigon de terminologia laboro. La tempo estas matura interkonsenti pri la praktikaj paŝoj bezonataj por atingi tion. Ĉu estas ĝenerala konsento, ke la plej taŭga komencpunkto estas plibonigi la organizan bazon de la Akademio de Esperanto? Kiu pretas dediĉi energion, (kaj sendube monon!), por helpi atingi tion?

Viaj pensoj, ĉu profundaj ĉu supraĵaj, pri tiu ĉi temo estas bonvenigitaj kaj zorge taksataj por aperigo en la Laŭokaza Novaĵletero. Se vi havas firman konvinkon pri la temo, nun estas bona epoko konatigi tiun opinion al la Estraro de UEA; argumentoj por ambaŭ flankoj egale valoras en la serĉo por la plej taŭga politiko certigi racian evoluon de la lingvo kaj movado kiu estas Esperanto.

Ĉi-foje necesas aldoni klaran deklaron, ke tiu ĉi surpaperigo de pensoj kaj konkludoj ne estis prezentita, antaŭ publikigo, al la Estraro de IKEF por aprobo. Sekve, aprobo de tiu Estraro ne estas garantiita; opiniesprimoj de niaj Membroj estas pli ol iam bezonataj por indiki al la Estraro la fonan sintenon de la plimulto de la Membroj.

La sinteno de via Ĝenerala Sekretario estas nunkonata al vi egale kiel ĝi estas konata jam al la proponintoj de la TEC. Konigu vian opinion al ni, estas la persona petode, kunlaboreme via, Lorenc' Mi.

----- oo -----

Persona noto de la Ĝ.S.

Mi esprimas bedaŭron pro la aludo, pasintfoje, al nove starigata asocio de ne-tabakfumantoj. Poste evidentigis, ke la informiloj kaj revuo de la asocio estas preskaŭ senescepte en la franca lingvo; uzado de Esperanto, ŝajne, estis akcidento.

IDENTECSILDOJ

Sekve de la propono de D-ro Picasso, du Membroj jam prezentis por aperigo detalojn el kiuj kunmeti ŝildon.

Instituto Dex, 41080 Sevilla,
(Apartado postal 7131),
Hispanio;

- fabrikanto de medikamentoj por bestoj;
- lingva ebleco: hispana;
- kompetenteco: ĉiuj specoj de konsiloj pri medikamentoj por bestoj;
- eksportaj deziroj-eblecoj: ellaboraĵoj de la propra entrepreno;
- specialaĵo: medikamento por sendolore mortigi bestojn, (ĉefe dombestojn), sub la privata marko: "Dexutanol oral". Tiu ĉi manĝebla mortigilo, (havebla ankaŭ en formo injektable), estas unikaĵo pro la tute sendolora, kvankam rapida rezulto post manĝo allogaĵa;
- rilatoj: kun apotekistoj, veterinaroj, bestamantoj kaj bestprotektantoj.

Jean-Marie Mboge Mbele, Douala,
(B.P. 1816), Kameruno.

- reprezentanto pri komerco;
- lingva ebleco: franca;
- kompetenteco: peranto por investado en iu ajn fako de komerco en Kameruno;
- eksportaj deziroj-eblecoj: manlaboraĵoj de la lando; fruktoj ĉiuspecaj; medicinaj plantoj; lignoj; feraĵoj;
- importaj eblecoj: ĉiu speco de bezonaĵoj, sed precipe produktaĵoj de modernaj teknikoj el kiuj ĉefe maŝinoj por agrikulturo kaj la nutraĵindustrioj; tekstilaĵoj; pluraj specoj de nutraĵoj;
- rilatoj: kun investopretaj industriistoj, uzinoj kaj teknikistoj;
- aparta rilato serĉata: investopreta interesito por establi ferfandejo-entrepreno en Kameruno; tia aparta entrepreno tute mankas en lando kie la produktaĵoj de ferfandejo estas konstante serĉataj.

RAPORTO

La Foiro pri fiŝkaptado,
en Ankono, Italio.

La Internacia Foiro pri Fiŝkaptado okazis ĉi-jare de la 5-a ĝis la 8-a de junio, en Ankono, Italio. Vizitis la Foiiron eksterlandaj delegacioj el dudeko da landoj plus multaj enlandaj vizitantoj.

Inter la oficialaj lingvoj, agnoskitaj de la organiza instanco, estis ankaŭ Esperanto; la organiza instanco aperigis anoncojn en pluraj organoj de la Esperanto-gazetaro, kaj al Esperanto-parolantoj la Foiro sendis apartajn invitojn porsenpage vojaĝi al Italio kaj viziti la Foiiron mem.

Grava koncepto por la ĝenerala ekonomio de la Esperanto-komunumo, unuafoje elpensita kaj aplikita je tiu ĉi okazo, havis du celojn jenajn:

- 1 pruvi, ke en Esperantujo koneblas komunumo tre unuigita, tre kompakta, kies homoj tuj respondas inteligente, kaptante ne-kutiman okazaĵon por plivigligi propran idebtecon;
- 2 montri al Esperantistoj, ke ne ĉiam la ekstera mondo malestimias la kapablecon de la komunumo mem, sed eĉ foje pretas doni al la Esperantistaro ŝancon aŭdigi sian voĉon kaj vidigi sian organizitecon.

Ke ni ne plene atingis la celojn ne malvalidigas la provon. El tiaj malsukcesoj venas sperteco utiligebla por estontaj okazaĵoj, se ni pretas esti sufiĉe honestaj rekoni niaflankajn mankojn, krom kulpigi ĉiam la alulojn konatajn kaj nekonatajn.

El la multaj invitoj dissenditaj flanke de la Foiro mem, tre malmultaj vekis reagon, kvankam inter la reagoj estis kelkaj koneblaj kiel tre valoraj.

Aparte menciindaj estas ĉinaj amikoj en Akademio Sinica, kaj la Kultura Esperanto-Centro en

Svislando, kiu malfermis kontakton kun Sri-Lanko.

Al Afriko iris tri oficialaj invitoj, du el ili al Membroj de IKEF, kaj pro tiuj invitoj, S-ro Agbemadon en Togolando faris la vojaĝon al Italio. Bedaŭrinde, pro burokrataj malfacilaĵoj, lia veturo povis okazi nur kun malfrueco de unu semajno; li mistrafis la Foiiron mem, sed ŝajne faris bonegan impreson ĉe la organizantan instancan. El Ĉinio venis D-ro Shen Chenru, sed ankaŭ li venis kun malfruo, simile pro burokrataj malfacilaĵoj. Ambaŭ el tiuj du kunlaborantoj prezentis raportojn al la Foiro, kaj tiuj raporto estis akceptitaj por aperigo, en itala traduko, en la organo de la instanco. Aparte, raporto pri fiŝkaptado en Togolando, de S-ro Gbeglo, (ankaŭ membro de IKEF), bonege impresis la organizantojn.

Oni povas nur bedaŭri, ke la Esperanto-Movado ĝenerale ne pli entuziasme kaptis tiun ĉi, eble unikan, ŝancon ekspluati bonkorecon de ne-Esperantista organizaĵo montri eblecon al ni kapti la orelojn de al-ni-nova publiko.

Kiel faka organizaĵo plene dediĉita al akceptigo de la i.l. en ĉiuj kampoj de komerco, ankaŭ ni devas akcepti nian porcion de la kulpo; plenevidente, ni devas plifortigi niajn strebojn atingi multe pli vastan membraron kaj plifortigi nian financon bazon, por ke je estonta okazaĵo simila ni tuj trovas membron partopreni kaj nin reprezenti. Nia varbado devas esti direktita al la studenta mondo, eble, tiel ke ni akiru solidan bazon de junaj homoj, pretaj por entrepreni la vojaĝojn kaj soifaj por spertoj en novaj kampoj de homa laboro.

Marco Picasso.

(Iom adaptita el la originalo far Lawrence Mee.)

Okazaj informeroj

Deskribado de (la valoro de) havaĵoj.

Temo ofte miskomprenita, flanke de laikoj, estas tio de la sorto de mono investita de entrepreno pro aĉeto de konstruaĵo, ekipaĵo, materialaro aŭ simile.

Des pli ofte estas tiu ĉi temo miskomprenita de membroj de Esperanto-asocioj, ĉu lokaj kluboj, ĉu internaciaj organizaĵoj.

Por pridiskuti la temon, tute ne necesas pensi pri la kialo malantaŭ la aĉeto de la aparta haveco, kvankam tia aĉeto neniam okazas, espereble, sen bone elpensita kialo.

Ni supozu, do, ke loka E.-asocio aĉetas elektran skribmaŝinon, kaj ke vi, la leganto, estas Kasisto kies taskaro inkluzivas la du taskojn: klarigi al la Estraro de via asocio la financajn sekvojn de tiu aĉeto, kaj libroteni tiujn financajn sekvojn. Ni supozu, ke la aĉetprezo por la skribmaŝino estas 1 000 Steloj; ni flankenlasu diskuton pri la imposto pro aldona valoro.

Du praktikaj paŝoj sekvas: unue, kontroli, ke la sumo de la aĉetprezo estas disponebla en kuranta konto de la asocio, (kaj tio eble devigas la forprenon de la sumo el ŝparkonto), kaj due, efektive ricevi la aparaton, transdonante kontraŭ ĝi ĉekon aŭ alian pagordonilon. Tre povas esti, ke tiu praktika ago, ricevi la skribmaŝinon entenas veturkostojn, aŭ simile, pri kiuj vi faru taŭgan raporton. Por niaj bezonoj tie ĉi, ni diru, ke la sumo de tiuj kostoj estas 40 Steloj.

Dum kunsido de la Estraro, vi klarigu la metodon trakti la financajn sekvojn. Jen la metodo.

Vi faru takson pri la disponebla 'vivo' de la aparato. Taŭga takso estus sep jaroj post la lasta tago de la jaro en kiu la aĉeto estas farita. La aĉetkosto, inkluzive de la ligitaj kostoj de ricevo, estas 1 040 Steloj, sed nur parto de ĝi estas

efektive palpebla dum la kuranta jaro, ĉar en la proksima jaro kaj en post proksimaj jaroj, via Asocio disponos pri skribmaŝino sen la neceso aĉeti ĝin. Vi intencas, do, libroteni nur okonon de la kosto en la Spezokonto por la kuranta jaro; en la postaj sep jaroj, vi simile librotenos okonon en la Spezokontoj por la koncernaj jaroj.

Sed iu Estrarano atentigas vin, ke la Asocio devas pagi la tutan koston nun, en la kuranta jaro. Vi klarigas, ke tio estas absolute vera, sed la solvo kuŝas en malfermo de nova konto en la kontaro. Tiu konto ricevas la titolon: Investita kapitalo: ekipaĵoj.

Tiu konto ricevas debetan traktaĵon en la sumo de 1 040 Steloj, por egaligi la kreditan traktaĵon en la sama sumo por la konto: Kuranta poŝtĉekkonto, aŭ simile, kiam la pago kaj ligitaj kostoj estas efektividigitaj.

Vi klarigas, ke la posedo de la skribmaŝino signifas, ke la Asocio havas egalan valoron dispono kiel ĝi havus se la ekvivalenta sumo de mono estus tenata en la kuranta poŝtĉekkonto. Prave estas, vi klarigas, ke tiu sumo, se deponita en ŝparkonto, liverus enspezon en la formo de rentumo; kontraŭ tiu perdo de rentumo la Asocio spertos la grandajn avantaĝojn, kiuj normale sekvas el posedo de skribmaŝino.

Kiam poste, post la fino de la jaro, vi faras librotenpaŝojn por kunmeti la Spezokonton por la ĵus finita jaro, vi malfermas konton kun la titolo: Deskribado de havaĵoj.

Deskribado - daŭrigo.

Al tiu konto vi faras debetan traktaĵon en la sumo de okono de 1 040 Steloj, kiu estas 130 Steloj. Ekvivalenta sumo de 130 Steloj vi kreditas al la konto: Investita kapitalo: ekipaĵoj. En tiu konto la debeta saldo nun estas 910 Steloj.

La konto, Deskribado de havaĵoj, estas unu el la kontoj per kiuj vi konstatas la sumon de la 'kostoj', por la Spezokonto pri la jaro de agado.

La konto, Investita kapitalo: ekipaĵoj, estas unu el la kontoj per kiuj vi konstatas la sumon de la Aktivo-flanko de la Bilanco por la lasta tago de la jaro.

Aliaj bezonataj traktaĵoj dum kunmeto de la Spezokonto kaj Bilanco ne tuŝas la temon de tiu ĉi artikolo; siatempe vi, la Kasisto, klarigos ankaŭ ilin al la Estraro.

Versajne estas jam evidente, ke en la sep postaj jaroj, similaj traktaĵoj okazos, per kiuj la Spezokonto ĉiujare estas ŝargata per la kosto de okono de la aĉetprezo de la skribmaŝino. Intertempe, la debeta saldo en la konto, Investita kapitalo: ekipaĵoj, iom post iom malaltiĝas ĝis finfine la konto saldiĝas al nulo. Bone! la tuta kosto de la skribmaŝino estas deskribita.

Sed ho! la Asocio ankoraŭ posedas skribmaŝinon! Per tiu lasta konstato ni komencas kompreni la signifon de la termino: 'investi (monon)'.

(Parenteze ni pripensu la eblecon, ke intertempe la Asocio aĉetis aliajn ekipaĵojn, kiel fotokopiilon, komputoron aŭ simile gravan aparataron por helpi en la grava taskaro, akceptigi la internacian lingvon en mondon kiu ne pretas kredi, ke Esperantistoj ja vivas en la lasta kvarono de la dudeka jarcento. En tiaj kazoj, la traktaĵoj en la konto, Investita kapitalo, iom post iom pli kaj pli komplikigas, sed la baza metodo restas tute sensanĝ-

ita; bezonata estas nur diligenta atento al la detaloj, por kalkuli la efektivan sumon de la deskribado kiel tuto.

(Ankoraŭ parenteze, ni aldonu, ke tiu ĉi sistemigo de deskribado ne limiĝas al aĉeto de ekipaĵoj. Tute egale valoras teni kontojn pri investita kapitalo pro, ekzemple, libroŝranko kaj la enhavo de la Biblioteko; pro aparataro por prepari kafon; pro aĉeto de verde standardo por la Asocio, aŭ por la ekipaĵoj per kiuj ekspozicii la lingvon dum foiroj kaj simile. Se Estrarano kritikis la bazan ideon, dirante, ke per tia praktiko la Asocio konstante akumulas kapitalon, la Kasisto klarigas, ke precize tia sinteno estas tenata de ĉiuj sukcesplenaj entreprenoj, ĉu profitcelaj ĉu libervolaj. La Esperanto-Movado nur saĝe agas, se ĝi provas montri sukcesan vizagon al la ekstera mondo. Tiu ekstera mondo, ni memoru, juĝas nin ne per niaj aspiroj, sed per niaj atingoj.)

Por reveni al la temo de la Asocio kiu nun posedas elektran skribmaŝinon, ni konstata, ke dum kunmeto de la Spezokonto por la naŭa jaro, vi, la Kasisto, rimarkas, ke la neceso debeti la konton, Deskribado de havaĵoj, per 130 Steloj malaperis for, ĉar la tuta sumo estas deskribita. Kontrolo de la ekipaĵo evidentigas, ke la maŝino ankoraŭ bone funkcias kaj oni povas antaŭvidi plian plenan jaron de fidinda uzebleco.

Kontraŭ tiu jaro de uzebleco de la skribmaŝino, la Asocio certe pretas akcepti la modestan koston de 130 Steloj. Vi proponas al la Estraro, do, la enskribon de kostoj de 130 Steloj, kiel kutime, sed nun kiel kreon de rezervo en la sama sumo. Al la nova konto por tiu rezervo vi donu la nomon: Rezervo por estontaj aĉetoj.

Ĉiujare, la saldo en tiu konto, la Rezervo, aperos kiel ero en la Pasivo-flanko de la Bilanco. Pri eventuala eluzado de tiu Rezervo, ni kunmetos alian artikolon en tiu ĉi serio.

Foje valoras retrovi spurojn de pensoj aŭ agadoj malnovaj. Kiam, lastatempe, hazarde venis al atento artikolon de antaŭ kvin jaroj, ni legis ĝin kun intereso kaj konkludis, ke ĝi meritas pli vastan publikon. Jen ĝi.

REPRESITA el Revuo Laŭte! n-ro 37(55) por septembro-oktobro, 1981; eldonita de: Cercle espérantiste de l'Agenais, 47340 Laroque Timbaut, Francio.

La vojo antaŭen.

Mi estas obsedata per penso, ke, se jam Esperanto atingus akcepton pere de la amasoj, ĝi tiam tian akcepton akiras ĉar, kaj nure ĉar, homoj grandamase konstato, ke per la internacia lingvo ili povas ĝui materian 'profiton', kiun ili ne povas ĝui per iu alia metodo. (Ni pensu nur pri la disvastigo de la angla lingvo por konstati, kion povas fari la profitmotivo.)

Ne necesas diskuti la fakton, ke ni Esperantistoj ĝuas spiritan 'profiton' per kaj pro nia subteno de la i.l., nek ke ni ĉiuj forte deziras dividi tiun spiritan profiton inter ĉiuj homoj en la mondo. Sed tutevidente tiu spirita profito ne sufiĉas; 99.8 procento de la homaro ne parolas Esperanton, malgraŭ la naŭdek jaroj dum kiuj ĝi jam ekzistas.

Ĉiu leganto de tiuj ĉi vortoj bone scias, ke Esperanto, kvankam ne estante tute perfekta lingvo se ni aplikas al ĝi la rigorajn kontrolojn de lingvistikoj, tamen estas perfekta komunikilo inter homoj, ĉu ili interkomunikadas parole, skribe, morse aŭ per iu alia metodo. Esperanto estas bonega lingvo, tute taŭga por literaturo, ĉu proza ĉu poezia, por scienca esplorado kaj por disvastigo de sciencaj malkovroj, por interŝtataj traktadoj kaj por politikaj celoj ĝenerale, por kuni de kaj ĉiuj aliaj formoj de distraĵo, por edukado de infanoj kaj plenaĝuloj, ĉu ĝenerala ĉu faka, por interŝanĝo de opinioj pri filozofio, religio, arto kaj interhomaj rilatoj ĝenerale, kaj por komerco en ĉiuj ĝiaj multegaj formoj.

El tiu longa listo, la nura rubriko pri kiu ni devas konstati, ke Esperanto ne estas zata, (aŭ estas tre, tre malofte uzata), estas la lasta, en komercaj rilatoj. Strange, ĉu ne?, ke la plej

rikoltopotenca kampo estas precize tiu, kiun ni ne plugas!

Tradicie, verŝajne, la vorto 'profito' estas tabua vorto inter Esperantistoj. Dum la jaroj, pluraj generacioj de Esperantistoj sindone oferadas laboron, ofte sufiĉe streĉan laboron, tempon, ofte sufiĉe longdaŭran tempon, kaj monon, ofte sufiĉe pene akiritan monon, al la disvastigo de nia kara ideo, ke homoj povu interkompreniĝi senĝene trans la barilo de malsimilaj ĉiutagaj lingvoj, kaj per tiu facila interkomprenado akceli la alvenon de paco kun samtempa egaligo de vivriĉeco en ĉiu angulo de nia, mirinde riĉa, mondo.

Ĉu ne estas tro severa, se mi asertas, ke tiu sindonado estis kaj estas farata kondiĉe ke, per Esperanto, neniu persono spertu materian profiton? La nura alia ebla konkludo estas, ke Esperantisto estas aparta speco de homo, apartigita disde la grandega plimulto de la aliaj membroj de la homaro per nekapablo kompreni la plej simplan regulon de ekonomiko, ke laboro, (en la plej vasta senco de la vorto), devas esti rekompencata per akiro de la rezultato de (almenaŭ parto de) la laboro de alia homo aŭ aliaj homoj. Tiun konkludon mi ne trovas konvinka.

Tute povas esti, tamen, ke Esperantistoj ĝenerale simple forgesas alpiki al siaj laboroj por la i.l. la ĉiutagajn spertojn akiritajn per pangajna laboro por entreprenado aŭ instanco. Ĉi inter miaj legantoj estas iu persono, kiu ne alkutimiĝis jam al enspezo kaj elspezo de mono, al konservado de parto de la enspezo en iu tempo por ebligi ĝuadon de varo aŭ servo en alia tempo, al daŭra pliefikigo de la rezultoj de homa laboro per sciencaj kaj teknikaj malkovroj fare de esploristoj en kampoj en kiuj komerco sekvas la kutimajn vojojn; mallonge, al la grava rolo de profito?

Bedaŭrinda rezulto de tiu forgesemo de Esperantistoj estas, ke, tro ofte, la atingiĝoj de tiuj sindonaj oferiĝoj malaperas sen spure, foje post mallonga tempo. Neniu povas nun kalkuli la nombron de lokaj E.-societoj, kiuj siatempe floris sed poste malaperis, aŭ de revuetoj kiuj siatempe promesis gravan estontecon sed efektive vivis nur mallonge, aŭ de gravaj libroj, precipe fakvortaroj, kiuj aperis en nur la unua eldono, neniam reviziita nek korektita. En la plimulto de tiuj kazoj, la tempo-daŭro de la societo aŭ

revueto estas ligita al la vivo de unu persono, kaj la malapero koincidis aŭ kun la morto de tiu persono aŭ kun la eluzo de la fordonebla kvanto de la mono de tiu persono. Se ni aplikas al ĉiuj tiuj kazoj la normojn de ekonomiko, ni ne povas eviti la konkludon, ke la koncernata agado estis farata en maniero kiu ne certigis la kreon de la profito necesa por certigi la daŭrigon de la entreprenado.

Sendube, en kelkaj, eble multaj, kazoj, la intenco de la iniciatinto vere estis, ke la entreprenado neniel spertu profiton; en aliaj kazoj, la iniciatinto eble ne havis apartan sintenon, ĉu pro ĉu kontraŭ profito, sed simple neniel pensis pri ĝi, ne sufiĉe lerte faris la bazajn kalkulojn kaj baldaŭ trovis, ke daŭrigo de la entreprenado kostas ne-elteneblan elverŝon de propra mono.

Estas fakto preter dubo, tamen, ke la plenumo de iu ajn tasko kaŭzas elspezojn, en la plej simpla kazo elspezon de laboro, en aliaj kazoj de mono per kiu akiri la rezultato(j)n de la laboro de alia homo aŭ aliaj homoj.

Se iu tasko estas ade ripetita, tiu poŝto elspezo devas esti kovrita per enspezo, en la plej simpla kazo per kontentigo pro la rezulto de la laboro, en aliaj kazoj per mono aŭ valoraĵo en iu formo. Pli grave, en la kazoj kiam plenumo de la tasko postulas la uzadon de ekipaĵo en iu formo, la kvanto per kiu la enspezo 'kovras' la elspezon devas esti sufiĉe granda por ke, post pli-malpli longa tempodaŭro, sufiĉe da mono estas konservata por ebligi renovigon de la ekipaĵo. Enspezo de tiu 'plusa' kvanto de mono ne estas ago pro profito de la entreprenado; la kosto de eluzado de la ekipaĵo estas ordinara parto de la kosto plenumi la taskon. La kompostion konservado de tiuj plusoj estas nepre prudenta ago por malebligi la ĉesigon de la entreprenado en la tago kiam la ekipaĵo ĉesas funkcii, aŭ ne plu povas plenumi la taskon.

Por ebligi al la entreprenado vere flori necesas, ne nur, ke la kosto estas kovrita per la enspezoj, (laŭ la ĵusa klarigo), sed ankaŭ ke la 'plusa' kvanto de mono sufiĉas por ebligi akiron de plusa aŭ plukapabla ekipaĵo. En tia kazo, ne eblas ne rekonii tiun 'pluson' kiel profiton.

Mi revenas, do, al nia komencpunkto. Ni ĉiuj deziras, ke Esperanto atingu akcepton flanke de la mondo ĝenerale; necesa baza kondiĉo estas, ke E.-societoj, -instancoj kaj -entreprenoj floru vaste

tra la mondo; ligita kondiĉo estas, ke nunaj kaj estontaj Esperantistoj subtenu tiujn entreprenojn kiuj uzas la internacian lingvon kaj faras profiton. Ne-evitebla konkludo estas, ke la sinteno de la plimulto de ni, ke la vorto 'profito' estas tabua vorto, estas erara sinteno. La ebleco konstati komercan gajnon ligitan kun la uzado de la i.l. estas nepre antaŭkondiĉo por iu serioza provo akceptigi Eo-n ĝenerale en la mondo.

Eĉ se ni volas pensi, ke per akiro de kapablo en la internacia lingvo ordinara homo tiel ŝanĝus sian sintenon, ke ŝili libervole forlasus la uzon de la angla lingvo, (per kiu ŝili ne-eviteble rekonas gradan plialtiĝon en la propra vivnivelo, kaŭzitan per saĝa apliko de la profito normale ligita kun komerca interŝanĝo de varo aŭ varoj), kaj komencas fidi je la efikeco de neŭtrala interkomprenigilo en kampo en kiu ĝi ĝis nun neniel havis ŝancon pruvi tiun efikecon, ni devas agnoski, ke tiu volo estas nenio alia ol revo, por ne diri memtrompo.

Kaj la afero nun urĝas. Ĉiutage ni legas pri nova kresko de internaciaj komercaj rilatoj; racie de devas agnoski, ke la disvastigo de la usona dialekto de la angla lingvo ĉiutage akiras pli kaj pli da forto, dum la disvastigo de la vera internacia lingvo stagnas. Estas jam malfacile resti optimisma, ke Eo gajnos en la konkurso; se nia lingvo malvenkos en la komercaj rilatoj, restas malgranda ŝanco akceptigi ĝin en aliaj medioj.

Ĉis maksimume, niaj fortoj devas kunligiĝi nun en streboj plivastigi la uzon de Eo en komercaj rilatoj. Taŭga komencpunkto -- ĉar ni devas pensi pri agado kiu daŭros pli ol nur kelkajn tagojn -- estas en la kontotenado en lokaj societoj tiel, ke ĉiu membro baldaŭ kutimiĝos al la uzo de la fakaj, sed tamen ordinara, vortoj sedisaj en komercaj rilatoj. Sed alkutimiĝo al la 'komercaj' vortoj ne sufiĉas; Esperantistoj devas agnoski, ke en ĉiu ago fari akcepton, ĉu de vivnecesaĵo, de alia varo aŭ de servo farata de alia persono, la akceptanto donas al la liveranto ion da profito. Ni devas konscie serĉi metodojn doni tiun profiton al persono aŭ instanco kiu uzas la internacian lingvon; per ĉiu tia profito ni plifortigos nian propran intereson.

REKLAMANONCOJ REKLAMANONCOJ REKLAMANONCOJ

Reklamtarifoj:

a) por Membroj de IKEF:

unu anonceto ĝis inkluzive
ses linioj: senpage;

por pli longaj anoncetoj:
po 1 respnodkupono, (irpk),
por ĉiuj komenciĝantaj ses
linioj de 27 literspacoj.
Ĉiam: unuope mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF:

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ
por ĉiuj tri milimetroj de
longeco, enkadrigita,
sed kun minimumo de ok
irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita.
Por anoncoj je pli granda
larĝeco ol unu kolumno:
laŭ aparta interkonsento.
Ĉiam: tri aperoj de la sama
anonco en sinsekvaj kajeroj
por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 1,00 gld.

Adresŝanĝo:

Ekde la 1-a de septembro,
validas tiu-ĉi adreso:
S-ro J. Rapley,
C.P.O. Box 2252,
Auckland, Nov-Zelando.

La Stelo.

La valida kurzo por la Stelo
nuntempe en Nederlando
estas: 1.00 guldeno egalas
al 1.360 Steloj.
Respondecas: M.E.E., Ned.

Reklami estas informi;
ĉu pli vi informas,
des pli vi vendas.
Uzu la senkoston servon de
via propra komunikilo:
La Laŭkaza Novaĵletero.

Tiu
ĉi spaco estas
rezervita

por vi !

Pri pagoj al ni.

Ke ĉi-foje ni ne donas konsilojn pri pagoj ne signifas, ke ni ne plu havas bezonon de mono, sed nur, ke la tempo-daŭro inter via ricevo de tiuj ĉi linioj kaj la enoficiĝo de nova Financa Konsilanto estas nun tre mallonga. Pli bone ol fari pagon al la malnova adreso estas atendi ricevon de konsiloj de S-ro Rotsaert pri novaj pageblecoj.

La jarkotizo restas esti dudek guldenoj. Ni aparte bonvenigus promesojn de donacoj al nia Subtena Fondaĵo, por ebligi pagojn de kotizoj por la proksima jaro por tiuj valoraj Membroj, kiuj ne ĝuas eblecon mem aranĝi pagon.

Ricevitaĵoj.

La Redaktoro agnoskas kun danko ricevon de bultenoj kaj revuoj el pluraj landoj. Ne pli frue agnoskitaj estas:

el Francio:
la informilo, eldonita de Kultura Esperanto-Federacio de Orienta Francio;

el Italio:
l'esperanto, eldonita de I
Esperanto-Federacio;

el Kolombio:
Monata letero, de Andaj-Ondoj;

el Suda-Koreio:
La Espero el Koreujo, eldonita sub la patroneco de Korea Esp.-Asocio;

el Pollando:
Informilo por Interlingvistoj, eld. de Akademia Centro Interlingvistika;

turisma esperanto kalendaro, eldonita de Monda Turismo.

Ĉiuj tiuj presaĵoj eniras la Bibliotekon de IKEF.